numero 99

aprilo 2010

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Gravaj komunikoj

* Dum 2010 ne estos estrarelektoj kaj la aprobo de la jarraportoj okazos perpoŝte.

* Dum la UK en Kubo ne okazos oficiala ĝenerala kunveno, sed nur informkunveno.

* La IKEF-konto ĉe www.moneybookers.com estas nuligita.

## Enhavo

Decidoj de la estraro sekve al la jarraporto .................... 3
Komerca ero proponata en AIS-Seminario .................... 4
Ronda Tablo „EŬROPA UNIO – HIERAŬ, HODIAŬ, MORGAŬ” 5
Novaj membroj .................................... 5
Financa raporto pri 2009 ............................ 6-7
Ĝenerala raporto pri 2009 ............................ 8
Planoj por 2010 .................................... 8



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) [nur en aprilo en 2010] kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi.
**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, retpoŝto: roland.rotsaert(a)gmail.com.

La jara **membrokotizo** ekde 2008 estas 10 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio ‘A’ (‘riĉaj landoj’) kaj 5 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio ‘B’ (‘malriĉaj landoj’) (aŭ egalvaloro en konverteblaj valutoj). Kotizo estas por la kalendara jaro. Membro kiu aliĝas dum la jaro pagu proporcie pli ĝis la fino de la posta jaro. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Pro la malgranda aktiveco de la asocio, ekde 2010 la kotizo estas libervola.

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- per banko: petu kontoinformon de la kasisto

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)davincibrasil.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, paloc1(a)inbox.com

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org (rekte: http://sites.google.com/site/ikefesperanto/)

## Decidoj de la estraro sekve al la jarraporto

Sur la paĝoj 6-8 estas la financa kaj la jarraporto de IKEF por la jaro 2009. Pri kelkaj aferoj la estraro jam decidis; pri aliaj estas atendata la opinio de la membroj.

**Dum 2010 ne estos estrarelektoj**

Kutime ĉiujare parto de la IKEF-estraro estas reelektita. Ĉijare finiĝas la oficperio-do de la estraranoj Kurz kaj Wang. Konsiderante ke elektado estas peza administra proceduro, ke nuntempe la agado de IKEF estas malgranda kaj ke preferindas uzi ĉiujn fortojn prepare al la ‘relanĉo’ de IKEF okaze de la Universala Kongreso de 2011, la estaro decidis ĉijare ne okazigi estrarelektojn kaj silente plilongigi la oficperiodon de la estraranoj Kurz kaj Wang ĝis la UK de 2011.

**Aprobo de la jarraportoj**

La IKEF-statuto antaŭvidas jenon proceduron::

*7.4. La Estraro kunmetas ĉiujare raporton pri la agado de la Fakgrupo, inkluzive de raporto de revizoroj aprobante la kontotenadon, kaj tiun kombinitan raporton publikigas en la daŭro de maksimume kvar monatoj post la fino de la kalendara jaro al kiu ĝi rilatas. Principe, plena okazo por diskuto estu donata dum ĝenerala kunveno de la membraro, cele al aprobo de la raporto, sed en jaro dum kiu ĝenerala kunveno ne okazas, aprobo de la raporto sekvas aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretari-o indikas malaprobon. Alikaze, anonco de ĝenerala kunveno okazas samtempe kun publikigo de la raporto, kun minimuma averto de du monatoj.*

Ĉar nuntempe IKEF ne havas ĝeneralan sekretarion, malaprobantoj skribu al la kasisto, roland.rotsaert(a)gmail.com.

**Dum la UK okazos nur informkunveno, ne ĝenerala kunveno**

Ĉar eble neniu estarano kaj nur kelkdekaj membroj ĉeestos la UK, ne okazos ĝenerala jarkunveno de IKEF. IKEF ankaŭ ne estos en la faka forumo de la komenca tago, ĉar por la malmultaj kongresantaj membroj ne estos sufiĉe da tempo je alventago por prepari ĝin. Tamen, IKEF rezervis ĉambron por organizi neforma-lan informkunvenon dum la kongresa semajno. Tago kaj horo aperos en la kong-resa programo kaj mi esperas ke la ĉeestantaj IKEF-membroj pretos gvidi ĝin.



**Moneybookers-konto fermita**

Kvankam www.moneybookers.com ofertas rapidan kaj malmultekostan pagservon, ĝia uzo estis malofta. Por simpligi la IKEF-librotenadon la konto estis nuligita.

**Aferoj por kiu opinio de la membroj estas atendata**

Ekde la kreo de IKEF funkcias aro da perantoj. Ili havas du ĉefajn taskojn: diskonigi IKEF en sia lando kaj ricevi la lokajn kotizojn. Pro la alveno de interreto ambaŭ taskoj iĝis malpli gravaj: diskonigo de informoj nun ĉefe okazas tra retpaĝoj kaj retleteroj, kaj ekestis diversaj metodoj por sekure, rapide kaj malmul-tekoste fari internaciajn pagojn. Krome, kelkaj perantoj kiuj aktivas ekde la komenco maljuniĝas kaj deziras liberiĝi de tiu tasko.

Mi proponas ke pri tiu kaj eventuale pri aliaj eroj de la jarraporto la membroj interŝanĝu opiniojn en la Google-listo ‘komerco’
(http://groups.google.com/group/komerco).

Roland Rotsaert

## Komerca ero proponata en AIS-Seminario je 6-14 junio 2010

Ĉi jare la Seminario dezirus organizi apartan kunvenon por komercistoj invitonte ankaŭ bulgarajn komercistojn.Tiamaniere ĝi donos la eblecon al bulgaraj kaj eksterlandaj komercistoj kontaktiĝi.

BUS 7, la 7-a bakalaŭriga sesio de AIS, okazos ĉe la Internacia Universitato Karlovo (IUK) en Bulgario (BG), de 2010-06-06 (dimanĉo) ĝis 2010-06-14 (lundo), laŭ invito de EProf. Mag. Boĵidar Leonov, rektoro de IUK (leonov(a)rozabg.com). Dum BUS 7 okazos universitataj kursoj kaj prelegoj kaj studentaj finekzamenoj sur la nivelo de bakalaŭreco. La prelega sesio okazos grandparte lige kun la seminario pri apliko de Esperanto en la profesia agado (AEPA) kaj en la tempa kadro de la bulgar-pola studadsesio (2010-05-28 / 06-26) de IUK kaj ISTK (Bydgoszcz).

Jam certas jenaj eroj de la scienca programo:

* Bazaj principoj de turismiko. Ekologia kaj religia turismo (EProf. Leonov)
* Eŭrologio kaj eŭrolingvistiko: bazoj kaj celoj (EProf. A. Lewanderska-Quednau, Ilja Ĥristov)

* Enkonduko en la bulgaran lingvon (EProf. Leonov, Jovka Neĉeva; en la kadra programo)
* Enkonduko en la internacian lingvon (en la kadra programo)

Informoj je: www.ais-sanmarino.org (klaku dekstre je 'Aranĝoj').

**Ronda Tablo „EŬROPA UNIO – HIERAŬ, HODIAŬ, MORGAŬ**
**Lingvaj kaj kulturaj aspektoj" (Sarajevo, 29-31 oktobro 2010)**

Okaze de la 100-jariĝo de la E-movado en Bosnio-Hercegovino la Esperanto-Ligo de BkH organizos en Sarajevo de la 29-31-a de oktobro 2010 debaton ĉe la Ronda Tablo pri la supre menciita temo.

En la Ronda Tablo oni atendas partoprenon de kelkdeko da partoprenantoj kiuj prilumos plurajn aspektojn de la ĉeftemo, ekzemple eŭropan multkulturecon, konservon de etnaj kulturoj, kulturan superregadon, lingvajn rajtojn, lingvan diversecon, lingvan hegemonion, prilingvajn politikojn ktp.

La organizanto invitas ĉiujn potencialajn prelegantojn/referantojn kiuj pretus kontribui pri la temo sin anonci ĝis la 1-a de septembro 2010 al la adreso: Esperanto-Ligo de BkH, Kralja Tvrtka 19 (pf 452), BA-71000 Sarajevo, tel/fakso: ++387 33 537 119, rete: fetah.zvirac(a)energoinvest.com.

Repago de vojaĝkostoj kaj prizorgo de restadkostoj por prelegantoj/referantoj estas konsiderata fare de la organizanto.

Kadre de la aranĝo oni planas inaŭguri novan sidejon de la Ligo kaj solene prifesti la jubilean 100-jariĝon de la E-movado en Bosnio-Hercegovino.

La sekretariino, Vildana Delaliĉ

**Novaj membroj**

397. Jorge Enrique Cabrera, °1958, advokato (ne ellernita) kaj softvara programisto, Avellaneda 57 P 4 C, 1405 Buenos Aires, Argentino, jecteam(a)yahoo.com.ar, www.habeasdata.com
398. Dennis Keefe, °1951, instruisto, program-gvidanto, estro de lingvaj festivaloj, Ĉinio, keefeinchina(a)gmail.com



**Financa raporto pri 2009 (vidu tabelojn. je paĝo 7)**

*Je la 9a de marto 2010 doktoro Polerani, la revizoro de IKEF, skribis:*

*"Mi ricevis la dokumentojn kiujn vi sendis al mi pri la IKEF-librotenado de la jaro 2009. Mi ekzamenis tiujn dokumentojn kaj mi povas informi vin ke mi trovis ĉion en ordo: pro tio vi povas submeti la rezulton de la jaro 2009 al la aprobo de IKEF-anoj."*

Iom surprize, la kontoj montras profiton je 174,45 eŭroj. Tion ni dankas al la granda kvanto da antaŭpagitaj kotizoj; tio ne ripetiĝos. Antaŭvideblas ke la elspezoj dum 2010 nur iom malkreskos (ĝeneralaj kostoj, t.e. la kotizo kiel faka asocio de UEA, kiu havigas al ni senpagan salonon dum la UK, restos; kostoj de La Merkato malkreskos, ĉar estas antaŭvidata nur unu numero). La enspezoj multe pli falos: pro la malgranda agado de IKEF la ricevo de kotizoj iĝis preskaŭ nula; restas precipe la antaŭpagitaj kotizoj kaj la kotizoj de dumvivaj membroj. La ricevita rento restos je proksimume 25 eŭroj. (En la sumo de ricevita rento dum 2009 ankaŭ estas restanta parto el 2008; pro tio la sumo de 2009 estas pli granda ol kutime.) Tamen, la rezervoj de IKEF sufiĉas por daŭrigi la funkciadon de la asocio dum pluraj jaroj.

La kasisto havas du proponojn por simpligi la financojn de IKEF, sekve al ĝia malgranda aktiveco:

- Nuligo de la konto ĉe Moneybookers

Dum la pasinta jaro ĝi estis apenaŭ uzata. Krome, la kasisto translokiĝos fine de la jaro kaj evidentiĝis ke adresŝanĝo postulos sufiĉe pezajn formalaĵon rilate al Moneybookers. Ŝajnas preferinde nun fermi la konton kaj eventuale poste, se montriĝus la bezono, malfermi novan konton.

- Perantoj

La perantoj havas la taskon reprezenti kaj propagandi la asocion en sia lando aŭ regiono. Ili ankaŭ enkasiĝas kaj transpagas la kotizojn. Pro la alveno de interreto kaj pro la malpli kostaj bankaj pagoj, tiuj taskoj iĝis multe malpli gravaj ol en la komenca periodo de IKEF. Kelkaj perantoj ankaŭ maljuniĝas kaj deziras ne plu plenumi tiun taskon. Ĉu ni entute rezignu pri perantoj?

IKEF - Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo - Spezokonto kaj bilanco (en eŭroj)

Spezokonto por la jaro 2009

| Kostoj | 2007 | 2008 | 2009 |
|---|---|---|---|
| Ĝeneralaj kostoj | 196,00 | 242,40 | 177,00 |
| Elspezoj terminologia laboro | 0,00 | 0,00 | 0,00 |
| Kostoj de 'La Merkato' | 351,81 | 308,11 | 267,86 |
| Korespondado, telefonado, ktp. | 55,09 | 112,96 | 4,52 |
| Neta gajno de la jaro | 120,39 | 0,00 | 174,45 |
| | 723,29 | 663,47 | 623,83 |

| Rimedoj | 2007 | 2008 | 2009 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 594,65 | 568,80 | 583,15 |
| Donacoj | 35,00 | 0,00 | 0,00 |
| Ricevita rento | 26,67 | 15,04 | 40,68 |
| Vendo eldonoj | 66,97 | 0,00 | 0,00 |
| Makleraĵo pro anoncoj Monato | 0,00 | 0,00 | 0,00 |
| Neta malgajno de la jaro | 0,00 | 79,63 | 0,00 |
| | 723,29 | 663,47 | 623,83 |

Bilanco je 31 decembro 2009

| Aktivo | 2007 | 2008 | 2009 |
|---|---|---|---|
| Kaso | 0,00 | 190,93 | 226,40 |
| Poŝtĉekkonto belga | 474,75 | 0,00 | 0,00 |
| Konto ĉe Universala E-Asocio | 930,35 | 851,35 | 904,35 |
| Konto ĉe Flandra E-Ligo | 711,27 | 1.347,58 | 1.295,10 |
| Ŝparkonto ĉe Flandra E-Ligo | 1.595,37 | 1.595,37 | 1.636,05 |
| Kurantaj kontoj | 0,00 | 28,92 | 0,00 |
| Konto ĉe *Moneybookers* | 163,69 | 49,40 | 19,40 |
| | 3.875,43 | 4.063,55 | 4.081,30 |

| Pasivo | 2007 | 2008 | 2009 |
|---|---|---|---|
| Kotizoj antaŭpagitaj | 367,05 | 386,04 | 303,26 |
| Kapitalo dumvivaj membroj* | 1.118,04 | 1.392,88 | 1.322,88 |
| Subtena Fondaĵo | 20,00 | 20,00 | 20,00 |
| Kurantaj kontoj** | 94,96 | 68,88 | 64,96 |
| Transira konto | 0,00 | 0,00 | 0,00 |
| Kapitalo | 2.275,38 | 2.195,75 | 2.370,20 |
| | 3.875,43 | 4.063,55 | 4.081,30 |

| | 2006 | 2007 | 2008 | 2009 |
|---|---|---|---|---|
| kapitalo | 2.075,61 | 2.154,99 | 2275,38 | 2195,75 |
| rezulto | 79,38 | 120,39 | -79,63 | 174,45 |
| nete | 2.154,99 | 2.275,38 | 2.195,75 | 2.370,20 |

*Dumvivaj membroj: Shang, Li Renzhi, Wang, Pirlot, Huang, Zheng, Witdoeckt, Liu, Alfred Kobina Arthur, Hornecker
**Kurantaj kontoj fine de 2009 (pasive): Gilbert (48,88), Wang (16,08)



**<u>Ĝenerala raporto pri 2009</u>**

La estraranoj Hornecker, Kniess Mates, Ooba kaj Rotsaert estis reelektitaj per poŝta voĉdonado (fakte, ne alvenis iu voĉdono, do la reelekto okazis aŭtomate).

Aperis du numeroj de La Merkato. Ĉar eĉ por plenigi du numerojn mankas materialo, por la jaro 2010 estas planita nur unu numero (en aprilo). Kun helpo de nia membro Roger Borges la retpaĝo estis transigata de telenet.be al Google (sed la adreso www.ikef.org restas). La malnova loko ankoraŭ restos dum kelkaj monatoj, ĝis fina polurado de la novaj paĝoj. La reta membroadministrado funkciis kiel dum la pasintaj jaroj: iuj membroj senprobleme kaj regule uzas ĝin, dum aliaj ne sukcesas aŭ ne interesiĝas. Estis kreita unu diskutlisto 'komerco' ĉe Google, kiu anstataŭas la plurajn antaŭajn. La membronombro restas stabila je 115 fine de 2009.

**<u>Planoj por 2010</u>**

**Estrarelektoj**

La estraranoj Kurz kaj Wang atingas la finon de sia oficperiodo kaj estu reelektotaj. Ambaŭ rekanditatiĝas. Unuflanke, la kasisto emas ĉi jare NE organizi estrarelekton kaj silente plilongigi la mandaton de Kurz kaj Wang, pro la peza proceduro, pro la dormetanta situacio de IKEF kaj pro la malgranda intereso de la membroj. Reelekto de kompleta estraro okaze de la 'relanĉo' de IKEF dum la UK de 2011 povus simpligi la proceduron, tiel ke elektoproceduro nur estos bezonata ĉiun duan jaron. Aliflanke, eblas ke la nunaj estraranoj konas valorajn kandidatojn kiujn ili jam nun dezirus inviti al estraro, por ke ili povu kun la kolego(j) prepari relanĉon en 2011.

**Movada foiro kaj kunveno dum UK**

IKEF ricevis inviton por partopreni la movadan foiron je la komenca sabato de la UK. Por tio estas lanĉita peto al helpantoj; nur unu persono reagis, skribante ke li ne povas helpi. La kasisto do proponas ne mendi budon. Estis jam rezervita salono por duhora neformala IKEF-kunveno dum la UK. Inter la kongresanoj mi nombris dudekon da IKEF-membroj. Pasintjaraj spertoj montris ke ni povas fidi je iuj el ili por gvidi la kunvenon.

**Aliaj projektoj**

De tempo al tempo alvenas sugesto por partopreni en iu terminologia projektoj (lastatempe traduko de Eurovoc-tezaŭro), sed ne troveblas kunlaborantoj.

Roland Rotsaert